# Gazeto Andaluzia

Andaluzio por si por Hispanio kaj la Homaro

N-RO 8-9 2-a JARKOLEKTO APR - JUL -85

## 3a ANDALUZIA-KONGRESO DE ESPERANTO







15 - 18 Aŭgusto, 1.985

# Gazeto Andaluzia

Fondita en 1910
de D. JOSE GARZON RUIZ

EDITA - ELDONAS

Asociación Andaluza
de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo


ENHAVO


Nia lasta kongreso...1
Informoj..............2
Ĉu SDI aŭ Eŭreko?....5
La Arĥivo.............7
Paĝo de la Junularo..9
Alvoko...............10
Letero el la indianestro SEALTH..11
KAPE.................12
Redakcia Angulo.....13

Statuto de AEU..centraj paĝoj



REDAKTOROJ

Andrés MARTIN GONZALEZ. (MA)
José Mª RODRIGUEZ HERNANDEZ.(KO)
Alberto FRANCO RAMIREZ. (SE)

ADRESOJ

GFU (Sección Esperanto)
C/ Trinidad Grund 28, 2º
29001 MALAGA

Grupo de Esperanto IB SENECA
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Sevilja Esperanto Junulara
Organizo SEJO. C/ Pozo 3
41003 SEVILLA

Asociación Sevillana de E-o
C/ Sol 75
41003 SEVILLA



La opinioj verkitaj en ĉi tiu gazeto apartenas nur al la subskribantoj.



Kunordigas:
Rikardo F.A.R.
c/ Mauricio Legendre 19, 1ºB
28046 Madrid

Kunlaboras ĉi-numere krom la redaktoroj:
Julio Herrero Segura, Luis Gilperes Fraile, Slavko Šimunić.

## NIA LASTA KONGRESO

La okazigo de la "3-a Andaluzia Kongreso", en Seviljo, la ĵus pasintan aŭguston, konsistigis gravan paŝon en la maturiĝo de la Movado en nia regiono. Oni konstatis, ke la prilingvaj kapabloj de niaj anoj, ilia konscio pri la problemoj de nia asocio kaj ilia zorgado favore al Esperanto pliiĝas. Justas akcepti kaj valorigi tion. Tamen, kvankam la rekono de tiuj faktoj necesas por entuziasmigi kaj pravigi ĉiujn, evidentas, ke nepras apogi sin sur tiu realo por antaŭeniri senhalte.

Krom la normala agado de niaj grupoj konsistanta el la instruado de Esperanto, la estigo de esperantaj kunsidoj, k.s., konvenas plenumi ĉi tiun programon dum la venonta lernojaro:

a) Enkonduko de komputiko en la instruado de Esperanto. Memvideblas, ke ne temas pri iu mirakla rimedo por ebligi la sukceson en nia laboro. Tamen ĝi estos grava atentilo por personoj ŝatantaj la uzadon de komputiloj. Do, ĉar tute certe, oni povas lerni Esperanton per tiuj maŝinoj, ni devas profiti ĉi ŝancon por disvastigi la lingvon kaj instrui ĝin pli sukcese. Ĉirilate, de ĉi tie mi dankas, plian fojon, al samideano Miguel Ángel Sancho pro liaj klopodoj pri la estigo de esperantaj programoj.

b) Necesas, ke la kapableco de niaj asocianoj pligrandiĝu. Pro tio taŭgas, ke la funkciado de la Meza Kurso en niaj Esperanto-grupoj estu realo. Nia celo estu pretigi la ceterulojn, por ke dum la venonta lernojaro, t.e. de oktobro ĝis la okazigo de la "4-a Andaluzia Kongreso" en Granado, almenaŭ 50 personoj atingu la koncernajn diplomojn (pri elementa kaj meza kurso) de AEU.

c) Aliflanke, oni devas pensi pri niaj agadoj okaze de la Jubileo. Mi opinias, ke, je regiona nivelo, ni devas konsciigi ĉiujn (movadanojn kaj nemovadanojn) pri Esperanto

dum la jaroj 1986-a kaj 1987-a. Por sukcesi, eble necesos funkciigi paralelan organizon "Amikoj de Esperanto" ebligo ntan la antaŭeniron de la lingvo en nia socio.

Nun estas grava ŝanco, tre taŭga por realigi nian idealon, ĉar ni havas ĉiujn rimedojn por ebligi tion. La andaluzia popolo ekis atenti nin kaj atendas palpeblajn rezultatojn. Pro tio, kaj pro nia plej intima kontentiĝo, pliigu nian penadon por ke la nombro de AEU-anoj duobliĝu antaŭ la Kongreso de Granado.

Je la komenco de nia agado planu kaj mezuru la limigojn. Poste decidu agadi kaj, fine, plenumu malgraŭ ĉiuj malfaci laĵoj trovitaj.

Kaj neniam forgesu kontakti ofte aliajn samideanojn, al menaŭ letere. La sukceso alvenos pli-malpli baldaŭ.

Andrés Martín

# SEVILJO

- Finiĝis la 3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, en kiu precipe elstaris la prikomputikaj aranĝoj. La maŝinoj afable pruntedonitaj de Microshop S.A. altiris la atenton, aŭ plibone dirite, forrabis la menson de preskaŭ ĉiuj junaj kongresanoj, kaj tio eble malpligrandigis la nombron de ĉe estantoj al pli seriozaj, se tiel nomi, kunvenoj. Konklude dankendas la eldona helpo de la Sevilja Urbodomo kaj la si ndonemo de s-ano M. Ángel Sancho, kiu afable akceptis veni por gvidi la 1-an esperantan kurson pri komputor-lingvo BA SIC iam okazinta en Hispanio.

- La 16-an de septembro komenciĝos en Sevilja Esperanto -A kademio la unua elementa kurso de Esperanto de la nuna ler

nojaro. Ĝi gvidotas de samideano Francisco A. Antúnez. La komenca metodo estos tiu nova eldonita de nia akademio sur baze de la antikva lecionaro de Felipe González del Pino.

- Ĉi-jare ni klopodos por enkonduki Esperanton en la Sevilljan Universitaton, pli konkrete en la tiel nomatan "Instituton pri lingvoj", kie nun oni lernigas ok modernajn lingvojn. Espereb le venontjare oni lernigos 9.

- Kelkaj membroj de AEU profitis la kunvenon de HEJS (Hispana Esperantista Junulara Societo) en Madrido, de la 20-a ĝis la 23-a de septembro, por esplori la eblojn kaj fari la unuajn paŝojn por eventuala ellaboro de ia praktika enkonduko en la andaluziajn lingvovariantojn por esperantlingvanoj. En ĝi oni uzos apartan andaluzian ortografion.

# MALAGO

- La 1-an de julio komenciĝis en nia sidejo elementa kurso de Esperanto, sub la gvidado de s-ano Rafael López, prezidanto de la Malaga Grupo, kaj per la metodo "¿Sabe usted Esperanto?", de Jorge Hess. Ĝi okazas lunde, merkrede kaj vendrede, de la 8-a ĝis la 9-a vespere.

- Ĉiun mardon kaj ĵaŭdon, je la 8a vespere, kunvenas grupo da gesamideanoj por instruiĝi pri la meza kurso per la metodoj "Paŝoj al plena posedo" de William Auld, kaj "Gvidilo por meza ekzameno" de Andrés Martín.

- La revuo "Cenaĉero", organo de nia Grupo, aperis denove la pasintan aŭguston, post la kursfinaj ekzamenoj de ĝiaj redaktoroj. La numero 8-a aperis en septembro.

- La 5an de julio kaj dum preskaŭ unu horo estis intervjua
ta de Radio Cadena Española s-ano Andrés Martín, prezidan-
to de A.E.U.

- Ĉiumonate aperas en la loka ĵurnalo SUR unu artikolo gra
nda pri Esperanto kaj la movado. Ĝis nun aperis "En torno
al Esperanto" kaj "Homaranismo". Ĝis la jarfino ni ankoraŭ
aperigos 3 pliajn.

- Kiel ĉiam okazis, nia Grupo intencas ĉeesti ĉiujn kongre
sojn, ĉu naciajn, regionajn aŭ universalajn. Ĉi jare , pro
kelkaj malfacilaĵoj, nur 3 delegitoj povis vojaĝi al Karta
geno. Tamen, unu monaton poste nia partopreno en Seviljo e
stis nombra.

- La sekvajn 14-an kaj 15-an de decembro ni atendas la vi-
ziton de niaj aliaj andaluziaj gesamideanoj. Ni festos ĉi
tie la Tagon de Zamenhof kaj samtempe klopodos por propag-
andi la internacian lingvon.

- Kelkaj radiostacioj en Malago elsendas, de tempo al tem
po, kanzonojn en Esperanto, dank´ al la sonbendoj donacit-
aj de nia Grupo.

J.H.S.

## KORDOVO

- La venontan monaton oktobro komenciĝos la Elementa Kurso
de Esperanto, kiu okazos, kiel ĉiujare, en la Gimnazio SE-
NECA, Avenuo Menéndez Pidal s/n.

- 10 geesperantistoj kaj geesperantanoj de Kordovo organi-
zis etan vojaĝon antaŭ ol iri al la Sevilja Kongreso. Ili

vojaĝis al Jaeno, Kazorlo kaj Granado, kie oni profitis por disdoni E-broŝurojn kaj informi pri la lingvo ĉiujn interesatojn, kiujn ili ekkonis dum la vojaĝo.

---

Kuraĝon, AEU-ano! Vi estas nepra, nemalhavebla en Andaluzio. Neniam forgesu tion!

---

## ĈU SDI AŬ EŬREKO ?

Antaŭ kelke da tempo la usona prezidanto R. Rejgan´ informis al la mondo pri decido de sia lando rilate al programo por la defendo de Usono. Samtempe oni invitis ĉiujn amikajn landojn partopreni en la projekto, konata kiel Iniciato por la Strategia Ddefendo, kvankam la ĵurnaloj baldaŭ komencis nomi ĝin "Galaksimilito" (memore al samnoma usona filmo). Usono petis al siaj amikaj landoj kunlaboron laŭ du flankoj. Unue Usono bezonis monon por pagi la grandegajn kostojn de ĉi projekto, kaj por tio ne sufiĉis la dolaroj, sed ankaŭ la japanaj enoj kaj la eŭrodolaroj. Due, Usono bezonis ankaŭ la eŭropajn kaj japanajn sciencistojn. Kompense la amerika lando oferis du interesajn rezultojn al tiuj landoj kiuj deziras partopreni en la projekto: formi la naciajn sciencistojn en Usono kun la plej avangardaj teknikoj kaj due oferi la t.n. "nuklearmilombrelon", kio supozigas la defendon de la lando kontraŭ la sovetaj misiloj pere de usonaj kontraŭmisiloj, elĵetotaj dank´ al la usonaj militaj satelitoj.

---

Kapabliĝi estas tute necese por indiĝi AEU. Enskribu vin en niajn kursojn. Petu informojn de niaj sidejoj de Kordovo, Seviljo kaj Malago!

La usona iniciato, do, temas pri ekskluziva aplikado de la scienca avangardo al la armil-agadkampo, kaj pro tio Usono bezonas ne nur siajn grandajn rimedojn, sed ankaŭ tiujn de Japanio kaj Eŭropo.

Tamen kelkajn monatojn poste la franca prezidanto F. Miterand', informis al la eŭropaj prezidantoj pri sia projekto "Eŭreko". Ĉi tio estas aro da sciencaj programoj kiuj celas ne nur la fabrikadon de modernaj armiloj sed ankaŭ de sciencaj iloj kiuj estos je la nivelo de la 21-a jarcento. La franca projekto volas precipe disvolvi la okcident-eŭropan esploradon kaj samtempe ĝi intencos eviti la t.n. "forkuradon de eŭropaj cerboj" al la usonaj laboratorioj. La intereso por ĉi tiu projekto estis granda, la unuan kunvenon ĉeestis reprezentantoj de la landoj de la EEK (jam kun Hispanio kaj Portugalio), la skandinava komunumo kaj ankaŭ la neŭtralaj eŭropaj landoj Svisio, Aŭstrio kaj Finnlando.

Sed ĉi unua kunveno ne estis tre sukcesa, nek Germanio nek Britio deviĝis efike kunlabori kun la franca projekto, precipe ĉar ili ankaŭ partoprenos en la usona iniciato; ankaŭ okazis kelkaj konfliktetoj inter landoj, ekzemple Francio ne deziris ke Finnlando ĉeestu ĉar ĉi skandinava lando estas la ununura kiu subskribis Pakton kun Sovetunio por Interlanda Amikeco, kaj ĉi tiuj bonaj rilatoj, laŭ Francio, povas provoki uzadon en Sovetunio de la eŭropaj avangardaj teknikoj.

---

Jam aperis la Enkonduka Kurso de Esperanto eldonita de Sevilja Esperanto-Akademio. Ĝia prezo estas nur 100 pesetoj. Tuj petu de nia adreso: Academia Sevillana de Esperanto, Sol 75. 41003-SEVILLA.

# STATUTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

## STATUTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

1.- Oni fondas "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo" kiu funkciu laŭ la jena statuto kaj la reganta "Leĝo pri Asocioj".

2.- La celoj de la Unuiĝo estas iniciati la instruan de la lingvo Esperanto en Andaluzio kaj kunordigi la agadojn de lokaj grupoj per la utiligo de ĉiuj leĝaj rimedoj por plenumi tiajn celojn.

3.- La ĉefa domicilo de la Unuiĝo estos strato Pozo, 3, Sevilla. Eblos estigi sidejojn en aliaj urboj laŭ konsento de la Estraro, kiu rajtos ŝanĝi tiel la domicilon kiel la sidejon.

4.- La Unuiĝo agadu en Andaluzio, daŭru senlime kaj malfondiĝu nur laŭ akordo de la Generala Asembleo kaj pro iu ajn el la motivoj antaŭviditaj en la Leĝoj.

5.- La Estraro estos la kompetenta organo por klarigi la regulojn enhavatajn en ĉi tiu statuto kaj aldoni kompletigajn normojn ĉiam akorde kun la reganta regularo pri Asocioj. Jena Statuto estu eksplikota kaj plenumota laŭ validaj konsentoj efektivigitaj de la Estraro kaj de la Generala Asembleo akorde kun ties respektivaj rajtoj.

6.- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo konscias pri la elstara laboro plenumita de la andaluziaj esperantistoj dum la unuaj jardekoj de nia jarcento kaj tiu-rilate favoros al traserĉaj taskoj pri ĉi tiu epoko kaj klopodos eldoni verkojn en ĉi tiu internacia lingvo.

7.- La Unuiĝo tre klopodos agadi ĉe la junularo. Por plenumi tion, ĝi rajtos starigi junularan sekcion kiu kunordigu proprajn agadojn plenumatajn de la gejunuloj kaj ĉi tiu sekcio rajtos havi internan regularon ne kontraŭan al jena Statuto.

8.- La Unuiĝo rajtos eldoni, se la financaj kapabloj tion ebligos, inform-bultenon montrantan la plenumitajn agadojn.

9.- La Prezidanto, la Estraro kaj la Generala Asembleo regos kaj administros la Unuiĝon.

10.-La Prezidanto de la Asocio reprezentos leĝe la Unuiĝon, efektivigos la akordojn de la Estraro kaj la Generala Asembleo, kaj prezidos la kunsidojn de ambaŭ.

11.- Konsistigu la Estraron unu Prezidanto, unu Vicprezidanto, unu Sekretario, unu kasisto kaj tiom da voĉdonantoj kiom da provincoj elektis reprezentanton antaŭ ĉi tiu Estraro.

12.- La postenoj de la Estraro estu senpagaj, elektiĝu de la Generala Asembleo kaj daŭru kvar jarojn kvankam ĉiam eblos elekti denove ĝiajn membrojn nedifinite.

13.- La Estraro programos kaj direktos la agadojn, prizorgos administre kaj finance la Unuiĝon kaj submetos al la Generala Asembleo la jaran budĝeton same kiel la financan situacion de la antaŭa jaro.

14.- La Estraro okazigu siajn kunvenojn ĉiam kiam proponos tion la Prezidanto aŭ la Vicprezidanto, laŭ propra iniciato aŭ laŭ peto de kiu ajn el siaj membroj. Estos prezidataj de la Prezidanto kaj, kaze de ties foresto, de la Vicprezidanto aŭ de la Sekretario, laŭ ĉi ordo, kaj kaze de foresto de ambaŭ, de la plej aĝa membro de la Estraro.

15.- Por ke la akordoj de la Estraro validu ili devos esti akceptitaj de la plimulto de voĉdonoj de la ĉeestantoj. La Sekretario skribos kaj subskribos akton kopiendan en la koncerna libro.

16.- La membroj de la Estraro prezidu la komisionojn kiujn la Estraro mem konsentas starigi celante delegi en ilin la aranĝon de iuj agadoj aŭ agoj aŭ atingi de ili necesajn informojn. Konsistigu tiajn komisionojn la ensemblo da voĉdonantoj konsentita de la Estraro laŭ propono de iliaj respektivaj prezidantoj.

17.- La Prezidanto de la Estraro ĝuos, krom ankaŭ la rajtoj menciitaj en la 12-a regulo, la jenajn:

a) Alvoki la kunsidojn kaj fini la okazigitajn de la Estraro kaj de la Generala Asembleo, gvidi la respondajn diskutojn kaj, kaze de egaliĝo, decidi per sia propra voĉdono.
b) Proponi la Agadplanon de la Unuiĝo al la Estraro , impulsante kaj direktante ĝiajn laborojn.
c) Ordoni la plenumon de pagoj konsentitaj valide.

La Prezidanto estos helpata en sia laboro, de Vicprezidanto, kiu, aliflanke, anstataŭos lin kaze de vakanteco, foresto, malsano aŭ morto.

18.- La Sekretario ricevos kaj formale paŝigos la aniĝo - skribpetojn, prizorgos la Slipujon, la Registrolibron de Asocianoj kaj la direkton de la administraj taskoj de la Unuiĝo.

19.- La Kasisto prizorgos la librotenadon de la Unuiĝo, notos kaj kontos en- kaj elspezojn, intervenante ĉiujn ekonomiajn operaciojn. Plie, monkolektos kaj gardos la kapitalon apartenantan al la Unuiĝo kaj plenumos la pagordonojn de la Prezidanto.

20.- Konkrete, koncernos al Sekretario klopodi pri la plenumo de la regantaj leĝaj normoj rilataj al Asocioj, per la gardo de la oficiala dokumentaro de la Unuiĝo kaj per la pasigo al la Aŭtoritato de la informoj pri nomumo de la Estraro, precizigo de la spezoj kaj aprobo de la jaraj budĝetoj.

21.- La ĝenerala Asembleo, konsistigita de ĉiuj anoj, estas la supera organo de la Unuiĝo kaj kunvenos ĉiujare okaze de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, por aprobi la Ĝeneralan Agadplanon de la Unuiĝo, kritikos la demarŝon de la Estraro kaj aprobos, se taŭge, la jarbudĝetojn pri en- kaj elspezoj, samkiel la kontan situacion rilatan al la antaŭa jaro.

22.- La Generala Asembleo kunvenos en eksterordinara sesio kiam tion postulos la validaj dispozicioj, aŭ tiel konsentos la Estraro atentante la traktendajn aferojn, kaj en ajna okazo por ekscii pri jenaj temoj: dispono aŭ vendo de havaĵoj, nomumo de la Estraro, aŭ peto de deklaro de Publika Utilo, modifo de Statuto kaj malfondiĝo de la Asocio.

23.- La alvokojn al la Generalaj Asembleoj, tiel ordinaraj kiel eksterordinaraj, oni faros skribe, notante la lokon, daton kaj horon de la kunveno.

24.- La konsentojn de la ĝeneralaj Asembleoj oni estigos laŭ la plimulto de voĉdonoj. Tamen, necesos la favora voĉdono de du trionoj el la membroj ĉeestantaj, aŭ reprezentitaj, por akordi en Generala Asembleo pri dispono aŭ vendo de havaĵoj, nomumo de Estraro, petoj de Deklaro de Publika Utilo, modifo de Statuto kaj malfondiĝo de la Unuiĝo.

25.- Rajtos esti membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo la personoj volantaj helpi, iumaniere, atingi ĝiajn celojn, kaj akceptitaj de la Estraro, kiu povos nomumi iun personon honora membro aŭ honora prezidanto laŭ sia bontrovo, nur honore kaj neniam kunportante la juran karakteron de ano.

26.- Ciuj personoj volantaj aparteni al la Unuiĝo skribpetos de la Prezidanto ties akcepton kaj ĉi tiu sciigos al la Estraro decidonta pri la akcepto aŭ malakcepto de la ano, sen ebleco apelacii kontraŭ la koncerna rezolucio. Oni ne atingas la membran karakteron ĝis oni pagos la aliĝkotizon laŭ la kvanto kaj la formo decidotaj de la Estraro.

27.- La Membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo havos ĉi tiujn rajtojn:

a) Partopreni la kulturajn agadojn iniciatitajn de la Unuiĝo kaj la sociajn agojn por ĉiuj anoj.

b) Praktitki la rajton montri sian opinion kaj voĉdoni en la Generalaj Asembleoj.

c) Esti nomumita membro de la Estraro laŭ la maniero antaŭvidita en la Statuto.

d) Havi ekzempleron de ĉi tiu Statuto kaj koni la akordojn estigitajn de la direktaj organoj.

e) Sciiĝi ĉiujare pri la speza situacio de la Unuiĝo.

28.- Estos devoj de ĉiuj aliĝintoj:

a) Respekti la jenan statuton kaj la akordojn estigitajn de la Generala Asembleo kaj de la Estraro.

b) Pagi la aliĝkotizon kaj la aliajn periodajn kotizojn deciditajn de la Estraro.

c) Plenumi la devojn proprajn al sia posteno.

29.- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ne posedas havaĵojn en la momento de sia fondiĝo. La limo de la jara budĝeto ne superas la kvanton de 80.000,- pesetoj.

30.- La ekonomiaj rimedoj antaŭviditaj por la plenumo de la sociaj agadoj estas:

a) La aliĝkotizoj determinotaj de la Estraro.

b) La periodaj kotizoj determinotaj de la Estraro.

c) La produktoj de havaĵoj kaj rajtoj apartenantaj al ĝi, samkiel la subvencioj, heredaĵoj kaj donacoj riceveblaj leĝe.

d) La enspezoj atingotaj de la Unuiĝo pere de licaj agadoj, kiujn la Estraro konsentos realigi, ĉiam akorde kun la celoj de la Statuto.

31.- La administradon de la kapitalo de la Unuiĝo oni plenumos sub kontrolo de la responda interveno kaj kun sufiĉa diskonigo, por ke la anoj povos scii periode pri la destino de la kapitalo seneksklude de la rajto menciita tiu-rilate en la apartaĵo e) de la regulo 27-a de ĉi tiu statuto.

32.- Kaze de malfondiĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, la Generala Asembleo akordonta la malfondiĝon nomumu komisionon de tri membroj el tiuj de la estraro prizorgontan la estontan kapitalon por ke, post ol pagi al la kreditoroj, oni liveru la ceteraĵon, se ĝi estos, al la Hispana Esperanto-Federacio, por ke ĉi tiu destinu ĝin al celoj samaj aŭ, se ili mankas, analogaj al tiuj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Kiel membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo vi certe posedas kopion de la teksto de la statuto de nia asocio. Dezirinda sekvo de ĝia lingva karaktero estas tio, ke vi ricevu ankaŭ esperantan tradukon.

Do jen ŝanco havigi ĝin al vi, kiun ni profitis por presi en disigebla formo. Tio estas, vi povas aparten kundisigi la paĝojn, kiuj enhavas la tekston.

Rilate al Hispanio, ankoraŭ nia lando ne decidis sian partoprenon en unu el la projektoj. La prezidanto F. Gonzalez asertis dum sia vojaĝo al Ĉinio ke eble Hispanio partoprenos en la usona iniciato; tamen la franca projekto tre interesas al la hispanaj industrioj ĉar Eŭreko diskonigos al la eŭropa kontinento la plej gravajn rezultojn de la scienca esplorado, kio estos profitindaj por ĉiuj eŭropaj landoj.

Ĉi ĉiuj komunaj scienc-programoj evidentigas kiel necesan la kunlaboron internacia en ĉi agadkampo. Eĉ la latinamerikaj landoj pensas jam kunigi siajn fortojn pri ĉi tiu temo en alia komuna scienca programaro kiu havos la nomon "Planedo". Ĉi ĉio pruvas ke ĉiuj landoj deziras eniri en la 21-an jarcenton kun la plej avangardaj teknikoj.

José María Rodríguez Hernández

## L A   A R Ĥ I V O

- La Historia Arĥivo de AEU alvokas...

Kiel vi jam scias, la arĥivo de AEU komencis kolekti ĉiujn esperantaĵojn kiuj povas esti interesaj por nia asocio kaj por kompletigi historion de la Andaluzia E-movado. Kvankam ni jam posedas interesegajn antikvaĵojn, ni scias, ke ankoraŭ estas multaj kongreslibroj, revuetoj, cirkuleroj, ktp, kiujn ni ne havas. Pro tio se vi havas ion kio povas esti por la Arĥivo interesa bv. sendi al ni fotokopion, ĉar

Urĝas pligrandigi la nombron de esperantistoj en nia lando. Varbu pliajn samideanojn!

ni ne volas ke vi perdu la posedon de la interesaj antikvaĵoj. Se vi deziras informi al ni pri tio kion vi havas, vi jam konas nian adreson: Historia Arĥivo de AEU
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

- Kiel uzi la Arĥivon ?

La Historia Arĥivo de la AEU estas je via tuta dispono, kaj ĝia plej grava celo estas ne nur la kompilado de konitaĵoj por eldoni estontece Historion de la E-Movado en Andaluzio, sed ĝi utilas ankaŭ por informi kaj sciigi ĉiujn gesamideanojn pri la historio de nia lingvo kaj movado en nia andaluzia lando. Pro tio ni volas informi pri tio, kia maniere vi povas uzi ĉi tiun AEU-fakon.

Se vi deziras demandi al ni ion, pri la Esperanto-Movado en Andaluzio ekde 1890 ĝis 1985, skribu nin kun la koncerna demando. Ni klopodos por respondi vin, kompreneble se ni havas sciojn pri tiu temo, kvankam ĉiuokaze vi ricevos respondon. Ĝis nun ni respondis la demandojn de 3 gesamideanoj kiuj volis scii ion pri la E-Movado de kelkaj urboj.

Do, profitu ĉi servon kaj skribu nin.

- Novaj Fakoj de la Arĥivo

Kune kun kongreslibroj, cirkuleroj, libroj, ktp, kiuj jam estis en la Arĥivo, ekde la pasinta monato oni jam organizis du novajn fakojn, unue ni ekkolektis ĉiujn fotografaĵojn de E-kunvenoj, do, ni jam posedas specialan albumon por ĉi fako. Ankaŭ, ni komencis sonbendigi kasedojn C-60, kun la intervjuoj programitaj en andaluziaj radio-elsendoj pri Esperanto.

Aĉetu la "Gvidilon por Meza Kurso" de AEU. Nur kostas 300 pesetojn plus sendokostojn. Mendu ĝin al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Trinidad Grund, 28-2ª Dcha. 29001 Málaga.

---

## PAĜO DE LA JUNULARO

Dum la pasinta Kongreso de Seviljo oni programis kunvenon de ĉiuj junaj gepartoprenantoj. Bedaŭrinde la oficiala kunveno de AEJ ne okazis, ĉar la programo de la kongreso ja estis tre densa. Tamen okazis konversacioj en trinkejoj kaj koridoroj kaj oni decidis okazigi la kunvenon en venonta kongreso aŭ kunveno. Same ni daŭrigos ĉi tiun Paĝon de la Junularo kaj venontjare ni eldonos NUN MI-n.

La provizora Estraro daŭrigos sian agadon ĝis la momento kiam okazos la unua kunveno de AEJ, kie oni elektos la unuan oficialan estraron. Ni jam ekricevis kelkajn leterojn kaj informpetojn de gejunuloj kiuj deziras esti membroj de AEJ, do por koni la nomojn de ĉiuj AEJ-anoj ni komencos en la sekvanta numero de la revuo liston kun la nomo, adreso kaj aĝo de la tuta membraro.

Denove ni informas ĉiujn gejunuloj ke por esti membro de AEJ necesas:

a) Esti membro de AEU malpli ol 30-jara.

b) Aŭ ne esti membro de AEU, sed same malpli ol 30-jara, kaj pagi membrokotizon, kiun oni jam difinos.

c) Skribi leteron al la suba adreso, kaj diri ke oni deziras esti membro de AEJ.

ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO
Apartado 611 14080 CORDOBA

---

Nia tuja celo: Duobligi la nombron de aliĝintoj al AEU.

Informo al la tutmonda esperantistaro !

MIL ŜERCOJ EL TUTMONDO

"MIL ŜERCOJ EL TUTMONDO" estas labortitolo de la libro, kiun mi preparas. Ĝis nun mi elektis UNU ŜERCON, sed mankas ankoraŭ 999 ŜERCOJ ?!?

Ŝercemuloj, spritemuloj, humuremuloj, ridemuloj kaj ridigemuloj, distremuloj kaj distrigemuloj... kaj ĉiuj ali aj skribemuloj, tradukemuloj, kompilemuloj, verkemuloj kaj kunlaboremuloj, mi atendas viajn kontribuaĵojn !??

Sendu al mi, mi petas, kolekton de DEK altkvalitaj , internacie kompreneblaj ŝercoj el via lando kaj vi havas unikan okazon kaj ŝancon almenaŭ per unu ŝerco "eternigi" ("antologiigi", "enciklopediigi"... kuraĝas mi eĉ diri ! ) vian nomon en libroforma ŝercokolekto tutmonda.

Desegnaĵoj ilustrantaj unuopajn ŝercojn estas dezirataj!

Eblas anticipa aperigo en "OVO" - internacia gazeto por distro kaj amuzo, kies ĉefredaktoro mi estas.

Mi kore antaŭdankas pro ĉiu kontribuaĵo. Limdato por alsendo: 31-a de decembro 1985!

Ne tro meditu, ne tro hezitu, ne tro prokrastu - agu TUJ !!!

**Slavko Šimunić**
JURNALISTO
YU-41000 Zagreb, Creska 18
JUGOSLAVIO

Ne sufiĉas krei; necesas daŭrigi. Kapabligu vin mem per la legado de "Kreu kaj daŭrigu". Mendu ĝin al AEU. Ĉi verko, tre taŭga por gvidantoj de la Grupoj, kostas nur 100 pesetojn.

---

Letero el la indianestro SEALTH

Tradukita el la hispana de
Luis Gilperez Fraile (SEVILLA)

(La "Granda Estro" el Vaŝingtono deziris aĉeti terenon al la indianoj. La tiama indianestro SEALTH skribis la suban leteron kiel respondon...)

Kiel oni povas aĉeti aŭ vendi la firmamenton, eĉ la varmon el la Tero? Tia ideo estas nekonata por ni.
Se ni estas la posedantoj nek de la malvarmeto el la aero nek de la briloj el la akvoj, kiel vi povos aĉeti ilin?
Ĉiu peco de ĉi tero estas sanktega por mia popolo. Ĉiu brila peco da pino, ĉiu sablero el la randoj, ĉiu akvero de roso en la malluma arbaro, ĉiu altebenaĵo kaj eĉ la sono de ĉiu insekto estas sanktega por nia memoro kaj por la estinteco de nia popolo. La suko, kiu cirkulas laŭ la vejnoj de la arboj, alportas la memoron de la indianoj.

La mortintoj de la blankuloj forgesas siajn landojn kiam ekpromenas inter la steloj. Tamen, niaj mortintoj neniam forgesas ĉi tiun boneman teron, ĉar ĝi estas la patrino de la indianoj. Ni estas parto de la tero kaj ankaŭ ĝi estas parto de ni. La parfumitaj floroj estas niaj fratinoj: la cervo, la ĉevalo, la granda aglo; ili estas niaj fratoj. La krutaj rokoj, la malsekiĝintaj paŝtejoj, la varmo el la korpo de la ĉevalo kaj la homo, ĉiuj apartenas al la sama familio. Pro ĉi tio, kiam la Granda Estro el Vaŝingtono se

ndas al ni la mesaĝon deziri aĉeti nian teron, li petas tro
e. Ankaŭ la Granda Estro diras ke li rezervos por ni lokon
por loĝi komforte. Li estas nia patro kaj ni estas liaj fi
loj. Pro tio ni konsideras lian oferton aĉeti niajn terojn.
Tamen, ĝi estas nefacila, ĉar ĉi tero estas sanktega por
ni. La glaca akvo, kiu kuras laŭ riveroj kaj riveretoj, es
tas ne sole akvo, sed la sango de niaj prapatroj. Se ni ve
ndas nian teron al vi, memoru, ke ĝi estas sanktega kaj an
kaŭ vi devu instrui al viaj filoj, ke ĝi estas sanktega ,
kaj ke ĉia fantoma rebrilo en la helaj akvoj de la lagoj ,
rakontas la agadojn de la vivoj de niaj avoj.
La murmuro el la akvo estas la voĉo de la patro de mia
patro. La riveroj estas niaj fratoj kaj satigas nian soif
on: ili portas niajn boatetojn kaj nutras niajn filojn. Se
ni vendas nian teron al vi, vi devu rememori kaj instrui al
viaj filoj, ke la riveroj estas niaj fratoj kaj ankaŭ viaj
fratoj. Do, vi devu trakti ilin same dolĉe kiel vi traktas
fraton.

daŭrigota

# KAPE

En la 3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto kreiĝis nova
kolektivo de junaj komputor-amantoj por Esperanto (KAPE ).
Komence ĝi eldonos revueton (SE...DO...), en kiu aperos es
perantlingvaj programoj faritaj de la membroj de tiu kolek
tivo kaj pluraj artikoloj tiutemaj. Tiu kolektivo volas ku
nigi ĉiujn esperantistojn (komence hispaniajn), kiuj emas
al komputiko por kune labori kaj interŝanĝi spertojn. Por
informiĝi vi povas adresi al:

K.A.P.E.
Atocha 98, 4ª 28012 - MADRID.
aŭ Pozo, 3 41003 - SEVILLA.

## REDAKCIA ANGULO

Kiel vi jam povis rimarki, ĉi tiu duobla numero enhavas ne la anoncitajn 16, sed 20 paĝojn. Ni volas kompensi ambaŭ la prokraston kaj la malmulteon per tiu pligrandigo kaj laŭeble rapida aperigo. Ni streĉas niajn fortojn tiel por ĝisdatigi la numerojn. Kio ne povis okazi pli frue, ĉar ni ĉiuj devas atenti pli urĝajn kaj premajn zorgojn. Tamen en ĉia okazo la plua aperado de nia gazeto-ligilo plu eblas dank' al la aktiva helpo kaj pasiva apogo de multaj samideanoj komune. Al ĉiuj koran dankon!

**SOLVO AL LA KRUCVORTENIGMO DE LA ANTAŬA NUMERO :**

1. K.
2. Fag.
3. Fajli.
4. Kajmano.
5. Glata.
6. Ina.
7. O.


ĈIESREVUINO
Distra, skandalema, fieca...
"S"-EVILA FANZINO
Jara abono 200 pes.
(4 NUMEROJ 4)
Petu provekzempleron kaj informojn de la Redakcio:
POZO, 3 41003-SEVILLA (HISP.)


Gvidantoj de kursoj: Aĉetu kaj legu "Kapabligu nin pedagogie". Ĝi kostas 100 pesetojn. Mendu ĝin al AEU. Vi ne pentos pro tio.

**ANDALUZIA**

**ESPERANTO - UNUIĜO**

**(A. E. U.)**

Pozo, 3
41003 - SEVILLA

Trinidad Grund, 28
29001 - MALAGA

Apartado 611
14080 - CORDOBA

ASOCIACION ANDALUZA

DE ESPERANTO